

Poezia bukedo de Bertram Potts

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-825/294, 1979 aŭgusto 02 kaj 04
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-44/SRI-1979-44-A-3-294-825-1979-08-02-04-Claude-kaj-Andree-Gacond-Poezia-bukedo-de-Bertram-Potts.mp3>


Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Se vi interesiĝis al la porinfana literaturo en Esperanto, vi tre verŝajne konas la eldonaĵojn de la amo-serio (Amo-Akademio, Tokio) por geknaboj de la mondo. La unua volumo estas japanaj fabeloj esperantigitaj de kolekto el Kibosha-anoj, lingve kontrolita de Josishi Simomura. Poste, kiel dua volumo aperis Ĉeĥaj fabeloj, libere rakontitaj de Valdemar Vinař kaj lingve reviziitaj de Teruo Mikami. La tria volumo revenigas nin al Japanio. Temas pri *Japanaj malnovaj rakontoj*, kolektitaj de Yanagita Kunio kaj tradukitaj de kolekto de KLEG-anoj. La lingvan kontrolon faris Miyamoto Masao. Ĉiuj volumoj estas ege plaĉaj prese kaj bilde.

A.- En la sama kolekto ĵus aperis kvara volumo titolita '*Poezia bukedo por geknaboj de la mondo*'. Temas pri originalaj poemoj porinfanaj de la novzelandano Bertram Potts. Denove la libro estas plaĉa kaj la ilustraĵoj eĉ vere allogaj.

Cl.- En sia enkonduko al tiu ĉi ne-ordinara libro, Marjorie Boulton tiel resumas la enhavon de la poemaro :

A.- La tema enhavo taŭgas por legantoj antaŭ-puberaj. Plezuroj kaj malagrablajoj de hejma vivo, kamparaj objektoj kaj bestoj, ludiloj kaj infanlibroj, bagatelaj miskondutoj, diversaj humoroj, fabeloj kaj fabelecaj temoj, infanaj okupoj, feriaj plezuroj, scivolemoj kaj la mondo de fantazio.



Cl.- Kaj ŝi aldonas personan juĝon.

A.- Kiel poeto mem, mi vere envias al Bertram Potts lian fantazion. Li ne nur kompreneme portretas la revojn de infanoj, sed kreas fantaziajn bildojn ĝoj-abunde. En la fantaziaj poemoj bildo rapide sekvas bildon. Bele elpensita detalo sekvas detalon. La poeto klaŭde kaj ŝaŭme baniĝas en sparkantaj vortoj.

Cl.- En tiu ĉi enkonduko Marjorie Boulton reliefas la gravecon de tiu libro por la instruistoj kaj gepatroj, kiuj povas esti dankemaj al Bertram Potts por la verko.

A.- Multaj gepatroj kredeble dankos, ke ili havas infanlibron, kiun ili povas laŭtlegi laŭpete, sen netolerebla naŭza tedo. Multaj instruistoj dankos por solida legolibro, kiu estas vere amuza kaj feliĉa. Kaj iam, multaj, kiuj nun estas infanoj, dankos al Bertram Potts, ke li kreis por ili poemojn, kiuj frue montris al ili la vivoplenan ĉarmon de Esperanto.

Cl.- Ni nin permesis citi sufiĉe longe el la enkonduko de Marjorie Boulton, ĉar ĝi alportas vidpunkton de poeto. Ĉar ŝi montris la gravecon de la libro por la instruistoj, ni nin permesos esprimi la reagojn de pedagogoj.

A.- Legante tiun ĉi poemaron ni do ekzamenis kian rolon ĝi povus plenumi en la Esperanto-instruado al infanoj. Kaj tuj ni konstatis, ke pro sia vortriĉeco jam lertajn esperanto-parolantojn ĝi celas.

Cl.- Neniun poemon povus vere kompreni infano, kiu ne plene asimilis la lingvon. Ni tuj konstatas, ke en la hodiaŭa situacio tio ĉi ege limigas la eblan legantaron de la libro. Ĝi konsistos ĉu el denaskaj esperantistoj bone regantaj la lingvon, ĉu el lernantoj jam bone progresintaj kaj fine ĉu el plenkreskuloj, ŝatantaj la porinfanan literaturon.

A.- Por ke vi ricevu ideon pri tiuj poemoj, ni legu unu el ili. Titolo : ‘La rano-kolegio’. Ni bedaŭras, ke ni ne povas montri al vi la akompanan ilustraĵon, kiu estas humurplena.

Cl.- Meritoplana rano fariĝis profesoro kaj fondis kolezion kun digno kaj honoro. Gajnante post reklamo studantojn kaj studentojn por lerni fremdajn lingvojn, muzikajn instrumentojn, filozofion, juron, pentrarton kaj ligikon, sciencojn kaj boksarton, kaj ankaŭ gimnastikon, farmadon, hipnotismon kaj kiel fari vestojn kaj studi ĵurnalismon kaj eĉ kuraci bestojn. Li fakte estris ĉion. Sufiĉas, ke mi diru, ke se vi volas lerni, vi senprokraste iru kaj enskribiĝu tuje ĉe rano-kolegio por gajni doktorecon laŭ via ambicio. Sed, mankas al mi tempo prezenti plenan liston. Mi antaŭdiros simple, se vi havas persiston, vi certe doktoriĝos, laŭ ran-lerneja plano. La sola klaŭzo estas : vi devas esti rano.

A.- Oni sentas en tiu ĉi poemo aludon al la kolegioj britaj fermitaj al parto de la infanaro, ekzemple al la knabinoj aŭ al la malriĉaj infanoj. Vi rimarkis la simplecon de la lingvaĵo, eĉ se ĝi vortare sufiĉe riĉas. Bertram Potts ŝatas doni liston de vortoj. En la ĵus legita teksto li listigas la studo-fakojn. Tiuj listoj ofte fariĝas tedaj. Eble en kolektiva recitado ili povus taŭgi, se vice la gelernantoj ilin deklamus. Sed mankas iom da spico. Tio estas varia humuro. Neniam tiuj poemoj vere provokas ridemon kaj tio igos ilin malfacile aprezeblaj de la publiko kaj rapide tedaj en la studado. Bertram Potts uzas la poeman formon por rakonti fantaziaĵojn, sed plej ofte laŭtleĝo ne donas veran poezian etoson. Tro ofte la versoj tro longas kaj mankas en ili interna ritmo. Jen ekzemple la komenco de poemo titolita ‘Mi legas en la lito’. Ĝin aŭdante oni ne havas la impreson aŭdi poemon.

Cl.- Tre plaĉas al mi legi en la lito rakontojn kun timigo kaj ekscito, pri nanoj, ranoj, elfoj, elefantoj kaj flamaj drakoj, monstroj kaj gigantoj, pri feoj, kiuj belan princon kronas. Pri ĉio, kio grandan fluon donas, ktp.

A.- Ni troviĝas do ofte antaŭ tekstoj, kiujn oni povus proze skribi. Kelkfoje la versoj mallongas. Tiam poezia etoso ekaperas, kiel en la ‘Senfolia arbo’.

Cl.-

Kara eta arbo, kompatinde nuda,
sola kaj mizera en la vintro kruda.
Ĉu vi ne suferas pro folio-perdo,
ĉu vi ne sopiras al printempa verdo ?
ktp.

A.- La ‘Ligna lulĉevalo’ ankaŭ apartenas al la sukcesaj bone ritmeblaj tekstoj.

Cl.-

Unu peco da ligno, du pecoj da ligno,
Kun najloj, segilo, martelo,
Tri pecoj da ligno, kvar pecoj da ligno,
Kun farbo kaj ledο por selo,
Ni faros por vi, diris paĉjo promese,
Lulĉevalon kun viglo por rajdi eksprese.

Unu horo da tasko, du horoj da tasko,
Dum paĉjo laboris trankvile,
Tri horoj da tasko, kvar horoj da tasko,
Ĝis ĉio finiĝis plenbrile.
Ĉu rajdos al Marso - li diris humure.
Kara paĉjo, mil dankojn,
Mi kriis plezure.

Unu krio da ĝojo, du krioj da ĝojo...
Ktp.

A.- Kiel vi certe konstatas, temas pri tre simpla poezio. Pri tutcerte facile kompreneblaj tekstoj por infanoj, kiuj havas sufiĉan konon pri la lingvo. Multon pli ni ne dirus kaj ni opinias, ke la enkonduko de Marjorie Boulton, el kiu ni citis en la komenco de nia recenzo, estis multe tro laŭda, kiel tre ofte okazas en esperantujo. Eĉ la poezia arto de Potts estas sufiĉe primitiva, eĉ tro primitiva laŭ mia gusto por vere bone efiki en la instruado.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond pri la libro 'Poezia bukedo' de Bertram Potts. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013